

LA ANĜEVA FOLIO

LA FEUILLE ANGEVINE

Samedi 5 MARS
14h - Centre Jean Vilar à Angers
Assemblée générale

Notota en via agendo :

Por sia jara ĝenerala kunveno, la anĝeva Esperantisto-grupo invitas vin sabaton la 5-an de marto 2016, ekde 14h en la kunvenejo Satellite de la Centre Jean Vilar en Angers (La Roseraie).

A noter sur votre agenda :

Pour son assemblée générale annuelle, le groupe espéranto angevin vous invite le samedi 5 mars 2016 à partir de 14h dans la salle Satellite du Centre Jean Vilar à Angers (La Roseraie).

KOMPRENADO FARAS PACON

Ĉi suba rakonto aperis en "Fen-X", la revuo de Esperanto Nederland, en 1999, okaze de la 90a datreveno de la Haarlema Esperanto-grupo. Transdonis al ni S-ino van Huis-Staritsky, amikino, kiu loĝas en Haarlem, urbo ĝemelita kun Angers kaj kiu permesas al ni ĝin publikigi.

La 15-an de marto 1909 Jan Willem Sevenhuijsen* fondis la Esperanto-klubon en Haarlem, kaj pripensis ĝian nomon "Komprenado Faras Pacon". La filino Nelly priskribis tiun tempon, kaj ankaŭ la viziton de ŝi kun la patro al D-ro Zamenhof.

Tiun interesan rakonton el la pratempo de Esperanto, kiu ankaŭ donas bildon pri la spertoj de rusoj kiu rifuĝis pro la oktobra revolucio, sendis al ni la nepino, S-ino Tanja van Huis-Staritsky. Nelly Sevenhuijsen rakontas :

MIAJ TRAVIVAĴOJ KUN ESPERANTO

En la jaro 1908, mia onklino Josephine Habermehl, la fratino de mia patro, legis en teozofia revuo artikolon pri Esperanto. Ŝi tuj estis entuziasma, rakontis pri tiu mondlingvo al sia edzo, al miaj gepatroj kaj al kelkaj amikoj. Ili ĉiuj volis lerni tiun lingvon, sed... instruisto en Haarlem ne estis trovebla. Per la teozofia revuo ili eksciis pri la adreso de Esperanto-instruisto en Amsterdam. Lia nomo estis Haan (Koko).

Tio estis la komenco de la Esperanto-movado en nia urbo Haarlem. La novuloj studis bone kaj en la jaro 1909 mia patro proponis fondi klubon. Tiel okazis. Mia patro, elektita kiel prezidanto, elpensis la nomon "Komprenado Faras Pacon". En la jaro 1911 okazis la 7-a kongreso en Antverpeno. Mia patro, mia onklino kaj kelkaj aliaj haarlemaj Esperantistoj decidis partopreni. Ankaŭ al mi, kiu ĵus lernis Esperanton, estis permesite kuniri. Ĝis tiam ni neniam parolis kun fremduloj. Ni estis tre scivolemaj.

Estis granda ĝojo, ke ni povis kompreni unu la alian, tamen ankaŭ estis elreviĝo. Kial?

Ĉar nia elparolado estis alia ol tiu de la plej multaj Esperantistoj.

Oni nomis la nederlandanojn "longvokaluloj". Anstataŭ A, E kaj O ni diris AA, EE kaj OO kiel en la nederlandaj "raak", "beek" kaj "rook". Do ni diris Eespeeraantoo, koomeencoo, Koompree-naadoo, aazeenoo, k.t.p. **

Mia patro estis iom konsternita kaj diris "Ĉu eestaas tiel maalboonee, kieel ni paaroolaas?" Li decidis tion demandi al D-ro Zamenhof mem. Sed dum la kongreso tio ne estis ebla.

"Ni iros al Krakovo venontan jaron", li diris. Bedaŭrinde tion li ne povis, ĉar la saman jaron okazis en Dresden kongreso de desegno-instruistoj kaj tiun mia patro nepre devis ĉeesti, ĉar li estis lernejestro kaj desegno-instruisto. La patro estis tre obstina kaj decidis iri al Varsovio "...ĉar tio estas sufiĉe proksima al Dresden!" - kio tute ne estas vera! Kaj nun komenciĝas mia efektiva rakonto. Mi volas esti tute sincera kaj diri, ke la vizito al D-ro Zamenhof ne estis la nura kialo por nia vojaĝo al Varsovio. Jam unu jaron mi korespondis kun juna rusoj kaj ni interkonsentis renkonti unu la alian en Varsovio. La vojaĝo de mia patro al Polujo, kiu tiam apartenis al Rusujo, estis tre interesa. Unue ni bezonis pasporton, kio en 1912 estis tre stranga afero. Due ni devis vagonŝanĝi ĉe la limo de Polujo, ĉar la spaco inter la reloj tie estas pli granda ol en okcidenta Eŭropo. La kontrolo estis severa. Ni vere estis en fremda lando, ĉar eĉ ne unu vorton ni komprenis! Estis multaj homoj sur la kajo kaj mi ĉion atente rigardis. Subite mi vokis "Paĉjo, rigardu! Jen viroj kiuj kisas unu la alian!" Mia patro rigardis kaj ankaŭ tre miris. Ni ofte vidis tian spektaklon. Oni neniam faras tion en nia lando. Eĉ fileto pli ol dekjara ne plu kisas la patron.

Dum la nokto ni dormis kvarope entrajne. Estis kvar benkoj, du supraj kaj du malsupraj. Mia patro kaj maljuna virino

LA COMPRÉHENSION FAIT LA PAIX

Le récit ci-dessous est paru dans "Fen-X", la revue de Esperanto Nederland, en 1999, à l'occasion du 90ème anniversaire du club d'Espéranto de Haarlem. Il a été transmis par Mme van Huis-Staritsky, une amie qui habite à Haarlem (Pays-Bas), ville jumelée avec Angers et qui nous autorise à le publier.

Le 15 mars 1909, Jan Willem Sevenhuijsen* fonda le club d'espéranto de Haarlem et lui donna comme nom : "Komprenado faras pacon" ("La compréhension fait la paix"). Sa fille Nelly relate cette époque ainsi que la visite qu'elle fit avec son père au docteur Zamenhof.

Ce récit intéressant des premiers temps de l'espéranto et qui donne aussi une image des expériences d'un réfugié russe à l'occasion de la révolution d'octobre, nous a été envoyé par la petite-fille, Mme Tanja van Huis-Staritsky. Nelly Sevenhuijsen raconte :

MES EXPÉRIENCES DE VIE AVEC L'ESPÉRANTO

En 1908, ma tante Joséphine Habermehl, la sœur de mon père, lut dans une revue de théosophie un article sur l'espéranto. Elle fut aussitôt enthousiasmée, parla de cette langue mondiale à son époux, à mes parents et à quelques amis. Ils voulurent tous apprendre cette langue, mais... pas d'enseignant à Haarlem. Ils obtinrent, par la revue de théosophie, l'adresse d'un enseignant d'espéranto à Amsterdam. Son nom était Haan (Koko).

Ce fut le début du mouvement espérantiste dans notre ville d'Haarlem. Les nouveaux élèves étudiaient bien et en 1909, mon père proposa de fonder un club. Ce fut fait. Mon père, élu comme président, pensa au nom "Komprenado faras pacon". En 1911, le 7ème congrès mondial d'Espéranto se déroula à Anvers. Mon père, ma tante et quelques autres espérantistes de Haarlem décidèrent d'y participer. De même pour moi, je venais juste d'apprendre l'espéranto, j'eus l'autorisation d'aller avec eux. Jusqu'alors, nous n'avions jamais parlé avec des étrangers. Nous étions très curieuses.

Ce fut une grande joie de pouvoir nous comprendre les uns les autres, cependant il y eut un peu de déception. Pourquoi ? En fait, notre prononciation était différente de la grande majorité des espérantistes.

On appelait les Néerlandais "traîneurs de voyelles". Au lieu de A, E et O, nous disions AA, EE et OO comme dans les mots néerlandais "raak", "beek"

kuŝis malsupre, pola junulo kaj mi supre. Mi vidis la maljunulinon, kiu komencis sin tute senvestigi. Vi povas imagi, ke mi tre interesiĝis kaj atente rigardis. Tion rimarkis la junulo, sed li povis vidi nenion. Li vidis mian patron, kiu hontis kaj dece sin turnis (tion li poste rakontis al mi). La junulo estis tre scivolema kaj demandis ion al mi, kion mi ne komprenis. Li sin klinis, klinis... kaj subite preskaŭ falis! Mi ekridis kompreneble. Tiam mi rakontis Esperante ke la subulino senvestiĝis kaj eĉ surmetis la noktan ĉemizon. Certe li ne komprenis la vortojn, sed per gestoj mi kvazaŭ formetis la ŝuojn, ŝtrumpojn, vestojn kaj finfine mi image prenis longan ĉemizon kaj ekdormis. La junulo ekridegis. Li certe komprenis la prezentadon. Do vi vidas, ke Esperanto ne estas nepre necesa! Kiam ni alvenis en Varsovio ni estis tute perditaj. La avertita delegito ne venis. Feliĉe ni havis la adreson de nia hotelo kaj ni iris tien per veturilo. Rusan monon ni havis. Iom senespere mia patro kaj mi sidis en lia ĉambro. Subite ni aŭdis voĉojn. Jes, Esperanton ni aŭdis! Frapo sur la pordo kaj jen envenis du junuloj. Ili estis studentoj kaj senditaj de la delegito, kiu estis malsana. Iliaj nomoj estis Voleviĉ kaj Finkelstejn. Kune ni vizitis ilian kunvenon. Tie oni parolis interalie pri starigo de statuo por Copin (Tsopin), ili kolektis monon por tiu celo. "Certe vi scias pri li?" Ni neis. Ili estis mirigitaj. Subite iu diris "Ho, eble vi diras Ŝopen!" Tuj ni diris "Jes, jes, ni tre ŝatas lian muzikon!" "Precipe la valsojn", mi aldonis.

Sed nun pri la vizito al D-ro Zamenhof. Unu el la studentoj kondukis nin al la loĝejo de D-ro Zamenhof. La loĝejo konsistis el etaĝo en granda domo, sufiĉe vasta, sed ne luksa. D-ro Zamenhof kore bonvenigis nin, same kiel la filino. La edzino estis en ripozejo; post kelkaj tagoj ili kune iros al Krakovo. Mia patro jam preparolis la prononcadon de la vokaloj. "Ĉu eestas maalgustee kiel ni paaroolaas?". Zamenhof milde ridetis. "Ĉu ni komprenas unu la alian, sinjoro Sevenhuijsen?" "Jees, kaaraa majstroo, tree boonee" diris la patro. "Nu", pluparolis

la Majstro, "tio estas la ĉefafero!" Neniam mi forgesos tiun decidon.

La filino servis teon. En la mezo de la tablo ŝi metis pladon kun kuketoj. Ŝi kaj ŝia patro kelkfoje prenis kuketon, sed ŝi ne proponis al ni. Fine D-ro Zamenhof demandis "Ĉu vi ne ŝatas kuketojn?" "Jes," ni diris, "volonte!" "Nu, prenu!" Pli poste mi aŭdis ke en Rusujo ne estas kutimo proponi kuketojn, fruktojn aŭ ion ajn. La plado kun frandaĵoj staras en la mezo de la tablo kaj ĉiu prenas ĝis la provizo estas elĉerpita. Tiel oni neniam faras en nia lando: preni sen propono estas malĝentile. Ni agrable babilis kun D-ro Zamenhof kaj lia filino. Mia patro kaj mi ankaŭ kantis himnon por li: "Zamenhof, ni benas vin pro Esperanto!" Li estis tre emociita. Tiam la studento venis por konduki nin al la hotelo. Ni kore adiaŭis nian Majstron kaj lian filinon kaj dankis ilin pro la gastemo. Ni havis neforgeseblan vesperon.

Ĉu mi denove renkontis mian rusan korespondanton? Certe jes, sed li venis tre malfrue kaj li ne povis viziti D-ron Zamenhof. Ĉu ni plaĉis unu al la alia? Mi kredas ke jes. Baldaŭ mia patro kaj mi devis foriri al Dresden por ĉeesti la kongreson de desegno-instruistoj, ni ne povis partopreni la Esperanto-kongreson en Krakovo, do mi ne plu parolis kun mia Ruso. Post hejmvveno ni denove interkorespondadis, sed tiam eksplodis la mondmilito kaj la interrilato finiĝis. Tamen, post pli ol dek jaroj mi kaj la Ruso geedziĝis - sed tio estas alia rakonto.

(daŭrigota en la posta numero)

(*) *Sevenhuijsen (Sevenhojsen) Jan Willem, Nederlandano, lernejestro. Naskiĝis la 3an de septembro 1858 en Bronwershaven, mortis la 10an de februaro 1923. Prop-isto en instr. rondoj. Prezidanto de TAGE kaj de la Vegetara Ligo Esperantista, estrarano de loka grupo. Reprezentis la ministron de instruado en la 12-a kaj 13-a UK. Aŭtoro de lernolibro por infanoj kaj de bildkartoj klarigantaj la gramatikon. (el la Enciklopedio de Esperanto).*

(**) *Tian prononcon konsilis la unua nederlanda lernolibro (1903), de Dreves Uitterdijk.*

kaj "rook". Nous disions donc Eespeeraantoo, kooomeencoo (début), Koomprea-naadoo (compréhension), aazeenoo (âne), etc. **

Mon père était un peu concerné et dit « Est-ce si mauvais coome nous paarloons ? » Il décida d'en parler au Dr Zamenhof même. Mais, pendant le congrès, ce ne fut pas possible.

«Nous irons à Cracovie l'année prochaine» dit-il. Malheureusement il ne put le faire parce que la même année devait avoir lieu à Dresde un congrès d'enseignants de dessin et mon père devait absolument y participer parce qu'il était directeur d'école et enseignant de dessin. Le père était très obstiné et décida d'aller à Varsovie «... parce que c'est suffisamment près de Dresde!» - ce qui n'est pas vrai du tout!

Je veux être totalement sincère et dire que la visite au Dr Zamenhof n'était pas la seule raison de notre voyage à Varsovie. Depuis déjà une année, je correspondais avec un jeune russe et nous avions convenu de nous rencontrer à Varsovie. Le voyage de mon père en Pologne, qui appartenait alors à la Russie, était très intéressant. Premièrement, nous avions besoin de passeports, ce qui en 1912 était une affaire très inhabituelle. Deuxièmement, nous devions changer de wagon à la frontière polonaise parce que là, l'espacement entre les rails était plus grand qu'en Europe occidentale. Le contrôle fut sévère. Nous étions vraiment dans un pays étranger, on ne comprenait pas le moindre mot! Il y avait beaucoup de monde sur le quai et je regardais cela attentivement. Soudain j'appelai «Papa, regarde! Des hommes qui s'embrassent!» Mon père regarda et était aussi très étonné. Nous vîmes souvent ce spectacle. On ne fait jamais cela dans notre pays. Même un gamin de plus de 10 ans n'embrasse plus son père.

La nuit, nous avons dormi à quatre dans le train, il y avait quatre banquettes, deux supérieures et deux inférieures. Mon père et une vieille femme prirent celles du bas, un jeune polonais et moi celles du haut. Je vis la vieille femme qui commença à se déshabiller totalement. Vous pouvez imaginer que j'étais très intéressée et regardais attentivement. Le jeune le remarqua mais il ne pouvait rien voir. Il pouvait voir mon père qui, honteux, s'était déceimment tourné (il me l'a ensuite raconté). Le jeune était très curieux et me demanda quelque chose que je ne pus comprendre. Il se pencha, pencha... et subitement tomba presque! J'éclatais de rire, bien sûr. Je lui racontais en espérant que la dame du dessous s'était déshabillée et avait même mis la chemise de nuit. Évidemment, il ne comprenait pas les mots mais par gestes, j'avais quasiment enlevé les chaussures, les chaussettes, les vêtements et finalement j'avais fait semblant de prendre une longue chemise de nuit et de m'endormir. Le jeune s'esclaffa. Il avait compris la présentation. Vous

La Teknika Vortaro de Greziljono baldaŭ aperos

La Teknika Vortaro de Greziljono, elpensita de nia anĝeva amiko Frédéric Lauriol, estos baldaŭ eldonita de **SatAmikaro**.

La aŭtoro ricevis subtenon de multaj Esperantistoj, interalie akademianoj, por la korektado de la ducent paĝoj. La vortaro ornamigis per humuraj desegnoj, ankaŭ fare de Frédéric.

Do, gvatu ni la lanĉadon de tiu teknika vortaro!



Frédéric Lauriol



Le Dictionnaire Technique de Grésillon, réalisé par notre ami angevin Frédéric Lauriol, sera bientôt édité par **SatAmikaro**. L'auteur a reçu le soutien de nombreux espérantistes et quelques académiciens pour la correction des deux cents pages. Le dictionnaire est enrichi de dessins humoristiques, également réalisés par Frédéric. Donc, guettons le lancement de ce dictionnaire technique!

voyez donc que l'espéranto n'est pas absolument nécessaire ! Quand nous arrivâmes à Varsovie, nous étions tout à fait perdus. Le délégué, pourtant averti, n'était pas venu. Heureusement, nous avions l'adresse de notre hôtel et nous y allâmes en voiture. Nous avions de l'argent russe. Sans beaucoup d'espoir, mon père et moi nous sommes assis dans sa chambre. Soudain, nous avons entendu des voix. Oui, nous entendions de l'espéranto ! Un coup à la porte et entrèrent deux jeunes. Ils étaient étudiants et envoyés par le délégué, malade. Ils se nommaient Volevich et Finkelstejn. Ensemble nous allâmes à la réunion de leur groupe. Là, on parla, entre autres, de trouver des fonds pour ériger une statue à Tsopin. Ils collectaient de l'argent dans ce but. «Vous le connaissez certainement ?» Nous répondîmes par la négative. Ils étaient très surpris. Soudain, quelqu'un dit «Ho, vous parlez peut-être de Chopin !» Aussitôt nous dîmes «Oui, oui, nous apprécions beaucoup sa musique !» «Surtout les valse», ajoutais-je. Mais maintenant, en ce qui concerne la visite au Dr Zamenhof. Un des étudiants nous conduisit au logement du Dr Zamenhof. Le logement occupait un étage d'une grande demeure, suffisamment vaste mais sans luxe. Le Dr Zamenhof nous souhaita cordialement la bienvenue ainsi que sa fille. Son épouse était en maison de repos ; dans quelques jours, ils iraient ensemble à Cracovie. Mon père parla bientôt de la prononciation des voyelles. «Çu

eestaas maalĝuustee kiel ni paaroolaas ?» (Est-ce incooreeect coomme proonoociaaation ?). Zamenhof sourit doucement «Est-ce que nous nous comprenons, M. Sevenhuijsen ?» «Oui cher maître, très bien» dit le père. «Eh bien» ajouta le Maître, «c'est ce qui compte !». Jamais nous n'oublierons une telle décision.

La fille servit le thé. Au milieu de la table, elle posa un plateau avec des petits gâteaux. Elle et son père se servaient, mais elle ne nous en proposa pas. Finalement le Dr Zamenhof demanda «Est-ce que vous n'aimez pas les gâteaux ?» «Si, bien sûr !» avons-nous répondu, «Et bien prenez !». Bien après, j'ai appris qu'en Russie, ce n'est pas la coutume de proposer petits gâteaux, fruits ou autres choses. Le plateau avec les friandises est posé au milieu de la table et chacun prend jusqu'à ce que le plateau soit vide. On ne fait jamais cela dans notre pays : prendre sans y avoir été invité est impoli.

Nous avons bavardé agréablement avec le Dr Zamenhof et sa fille. Mon père et moi avons chanté aussi un hymne pour lui «Zamenhof, nous vous bénissons pour l'espéranto !» Il fut très ému. L'étudiant vint alors pour nous conduire à notre hôtel. Nous avons dit cordialement adieu à notre maître et à sa fille et les avons remerciés pour leur accueil chaleureux. Nous avons passé un après-midi inoubliable.

Ai-je aussi rencontré mon correspondant russe ?

Oui, bien sûr mais il arriva très en retard et ne put rencontrer le Dr Zamenhof. Est-ce que nous nous sommes plu ? Je crois que oui.

Bientôt mon père et moi avons dû partir pour Dresde afin d'assister au congrès des enseignants en dessin. Nous ne pûmes participer au congrès d'espéranto de Cracovie, je ne pu parler davantage avec mon Russe.

Après le retour à la maison, j'ai de nouveau correspondu avec lui, mais la guerre mondiale éclata alors et les relations cessèrent. Cependant, dix ans plus tard, le Russe et moi, nous nous sommes mariés - mais ceci est une autre histoire.

(à suivre dans le prochain numéro)

(*)Sevenhuijsen (Sevenhojsen) Jan Willem, néerlandais, directeur d'école, né le 3 septembre 1858 à Bronwershaven, décédé le 10 février 1923. Militant dans des cercles enseignants. Président de TAGE et de la Ligue Végétarienne Espérantiste, responsable d'un groupe local. Représenta le ministre de l'Éducation aux 12ème et 13ème Congrès Mondiaux d'Espéranto. Auteur de livres de cours pour enfants et de cartes dessinées expliquant la grammaire (cf. la Enciklopedio de Esperanto).

(**) Cette prononciation était conseillée dans le premier livre de cours néerlandais (1903), de Dreves Uitterdijk.

En 1915, Ludwik Zamenhof, initiateur de la langue internationale Espéranto, était à Varsovie, ville occupée par l'armée allemande. Il a réussi à faire publier un texte, l'Appel aux diplomates, dans plusieurs journaux de divers pays en guerre.

Publié sur le site de SAT-Amikaro : <http://www.sat-amikaro.org/article248.html>

Alvoko al la diplomatoj !

lanĉita de D-ro Zamenhof en 1915 (eltiraĵoj)

Terura milito ekkaptis nun preskaŭ la tutan Eŭropon. Kiam finiĝos la grandamasa reciproka buĉado, kiu tiel forte malhonoras la civilizitan mondon, kaj kunvenos la diplomatoj, penos reordigi la rilatojn inter la popoloj ? Al vi, al tiuj estontaj reordigantoj, mi nun min turnas. (...)

Kiam vi kunvenos post la plej ekstermanta milito, kiun iam konis la historio, vi havos antaŭ vi eksterordinare grandan kaj gravan taskon. De vi dependos ĉu la mondo havu nun fortikan pacon por tre longa tempo kaj eble por ĉiam, aŭ ĉu ni havu nur kelktempan silenton, kiun baldaŭ denove interrompas diversaj eksplodoj de intergentaj bataloj aŭ eĉ novaj militoj. Pripensu do frutempe kaj tre zorge vian taskon, ĉar nun, kiam por via laboro estas oferitaj multaj centmiloj da homaj vivoj kaj milionoj da tre malfacile akiritaj homaj vivkondiĉoj, vi havos sur vi tre grandan moralan respondecon. Zorgu do, ke via laboro ne estu sencela kaj senfrukta, kaj ke post la fino de viaj laboroj la homaro povu diri : ni ne vane eltenis la grandegajn kaj terurajn oferojn. (...)

Ĉiu lando morale kaj materiale apartenas al ĉiuj siaj filoj. (...)

Plej bone estus, se anstataŭ diversaj grandaj kaj malgrandaj eŭropaj regnoj ni havus iam proporcie kaj geografie aranĝitajn "Unuiĝintajn Ŝtatojn de Eŭropo". Sed se nun estas ankoraŭ tro frue, por paroli pri tio, oni devas almenaŭ per oficiala kaj interkonsentita akcepto de la supre dirita principo forigi tiun grandegan malbonon, tiun senfinan fonton de konstantaj bataloj, kiun prezentas la identigado de lando kun gento. (...)

Sinjoroj diplomatoj ! Post la terura eksterma milito, kiu starigis la homaron pli malalten ol la plej sovaĝaj bestoj, Eŭropo atendas de vi pacon. Ĝi atendas ne kelktempan interpacigon, sed pacon konstantan, kiu sola konvenas al civilizita homa raso. Sed memoru, memoru, memoru, ke la sola rimedo por atingi tian pacon, estas : forigi unu fojon por ĉiam la ĉefan kaŭzon de la militoj, la barbaran restaĵon el la plej antikva antaŭcivilizita tempo, la regadon de unuj gentoj super aliaj gentoj.

Publikigita de "The British Esperantist" XI. 1915, p. 51-55 kun anglalingva traduko. "Esperanto" (Genevo) XII. 1915, p. 42 (6) - 43 (7). "La Verda Standardo", oficiala organo de la Hungarlanda Esperanto-Societo, 1915, n° 8, p. 1-4.

Appel aux diplomates !

Une guerre effroyable s'est maintenant saisie de presque toute l'Europe. Lorsque prendra fin cette boucherie de masse qui déshonore si profondément le monde civilisé, les diplomates se réuniront et s'efforceront de remettre de l'ordre dans les relations entre les peuples. C'est à vous, appelés à leur rétablissement, que je m'adresse maintenant. (...) Lorsque vous vous réunirez après la guerre la plus exterminatrice qu'ait connue l'histoire, vous aurez devant vous une tâche extraordinairement grande et importante. Il dépendra de vous que le monde ait une paix solide pour longtemps et peut-être pour toujours, ou que nous n'ayions qu'un silence de quelque temps, bientôt interrompu par diverses explosions de conflits inter-ethniques ou même de nouvelles guerres. Pensez donc de bonne heure et très consciencieusement à votre tâche parce que, maintenant, quand votre travail met en jeu des vies humaines par centaines de milliers et de bonnes conditions de vie très difficilement acquises par des millions d'hommes, vous aurez sur vous une très grande responsabilité morale. Veillez donc à ce que votre travail ne soit pas vain et infructueux, et qu'à la fin de vos démarches les hommes puissent dire : nous n'avons pas supporté en vain les immenses et effroyables sacrifices. (...)

Chaque pays appartient moralement et matériellement à tous ses fils. (...)

Ce serait mieux si, au lieu de grands et de petits États européens nous avions un jour des "États-Unis d'Europe" proportionnellement et géographiquement établis. Mais s'il est maintenant trop tôt pour en parler, on doit au moins, par un accord officiel et accepté sur le principe évoqué ci-dessus, éliminer ce grand mal, cette source infinie de conflits continuels que représente l'identification d'un pays avec une ethnique. (...)

Messieurs les diplomates ! Après l'effroyable guerre exterminatrice, qui a abaissé l'humanité plus bas que les bêtes les plus sauvages, l'Europe attend de vous la Paix. Elle n'attend pas qu'une pacification, mais une paix permanente, la seule qui soit digne d'une race humaine civilisée. Mais souvenez-vous, souvenez-vous, souvenez-vous que le seul moyen d'atteindre une telle paix est d'éliminer pour toujours la cause des guerres, séquelle barbare des temps les plus anciens d'avant la civilisation : la domination de certains peuples sur d'autres peuples.

Zamenhofa festo en Touraine

La Kultura Centro "Esperanto Touraine" invitis nin por la Zamenhofa festo, la 13-an de decembro 2015 - en la Kasteleto "La Devinière" ĉe François Rabelais - apud Chinon.

Ni (ĉirkaŭ 40 partoprenintoj de Tours, Le Mans, Angers, Nantes...) estis bone akceptitaj de la loka skipo en tiu dimanĉa mateno, per festa matenmanĝo en la manĝoĉambro "La Devinière". Jeanne Piron konigis al ni la lokan platkukon kun rijeto de Tours kaj la lokan ruĝan vinon "Le Berton". Post la kafo, ŝi ekkantetis refrenon "en Rabelaisie", kaj aliaj sekvis kunkantitaj!

Oficiala ĉiĉerono venis por anonci la viziton de la bieno; unue, privata posedaĵo kaj, nun, bieno de la Departementa Konsilio. Ni vizitis la eksterajn, internajn kaj subterajn lokojn de la farmbienoj, kie vivis Rabelais dum granda parto de sia infanaĝo. Agrabla korto ebligas atingi la vastan kolombejon aŭ la loĝejon. La kolombejo gastigas ekspozicion de multaj portretoj de Rabelais. En la unua etaĝo de la loĝejo, malantaŭ la kolombejo, ni vizitis la ĉambron de Rabelais. El la ŝtuparo, ni havas vidaĵon al la tre bela ĉirkaŭa kamparo kaj al la kastelo de Seully. Sub la tuta surfaco de la loĝejo troviĝas bone konservitaj troglodit-kavernoj por ŝirmi bestojn, agrikulturajn ilojn, vinpremlon, vinkelon kaj ankaŭ loĝejojn. Oni povis vidi tre belan kolekton de vinboteloj, el kiuj la plej granda, melchizedech, povas enteni tridek litrojn (1,10 m - 52 kg).

Pri la vivo de **François Rabelais**, ni ricevis tre interesan libreton engaĝigitan de Jacques Gaumé el la klubo de Tours. Vidu eltiraĵon ĉi-sube :

"Li naskiĝis ĉirkaŭ 1494 en La Devinière. Lia patro estis advokato en Chinon. Antaŭ siaj medicinstudoj kiujn li komencis en 1530 en Montpellier, li restadis en klostro ĉe la Benediktanoj.

Eksterordinara figuro de sia epoko, li estis ne nur benediktana monaĥo, sed ankaŭ kuracisto, profesoro pri anatomio, kaj paroĥestro en Meudon. En 1532, li kreis Gargantuon kaj Pantagruelon, kaj poste skribis la romanojn "Horribles et épouvantables faits et prouesses du très renommé Pantagruel" (1532), "La vie inestimable de Gargantua, père de Pantagruel" (1534), kaj aliaj verkoj "Tiers Livre" (1546), "Quart Livre" (1548), ktp., kiuj rakontas la sekvajn aventurojn de tiuj roluloj.

Sprita kaj klera, li estas perfekta ekzemplo de la renesanca spirito, la humanismo, renoviĝo de la filozofio kaj pensado. Li ŝatas miksi en sia verkaro la epikuran moralon, la gajecon kaj amon de vivo, filozofion pri la naturo. Li parte disvolvis kaj renovigis la francan lingvon de la 16-a jarcento, donante al ĝi pitoreskan kaj sukoplenan "guston". La universitato Sorbonne tamen malaprobis liajn verkojn, kaj la katolika eklezio malpermesis ilin. François Rabelais mortis la 9-an de aprilo 1553."

Post la vizito, ni iris en proksiman vilaĝon Cinais por festa manĝo en troglodita



gastejo. Inter ĉiu plado, ni faris tre agrablajn paŭzojn por kanti kun Famo (Fabrice Morandea). Ni petis de li kanti sole (Esperante) kaj muziki per sia akordiono "Amsterdam" de Jacques Brel (rememoroj de la bela nacia vespero en la UK de Lillo).

Dankon al ĉiuj por tiu amika, instrua kaj festa renkontiĝo.

Geneviève

Fête de Zamenhof en Touraine

Le Centre Culturel Espéranto-Touraine nous a invités pour la "Journée Zamenhof" - le 13 décembre 2015 au château de "La Devinière", pays de François Rabelais près de Chinon.

Nous fûmes fort bien accueillis (environ 40 participants de Tours, Le Mans, Angers, Nantes...) par l'équipe locale pour un petit déjeuner dans la salle à manger de La Devinière. Jeanne Piron nous fit découvrir la fouace régionale accompagnée de rillettes de Tours, et le vin rouge local "le Berton". Après le café, elle entonna un refrain "en Rabelaisie", et d'autres furent chantés en chœur !

Cet accueil festif fut suivi par la visite guidée du domaine (tout d'abord possession privée, puis bien du Conseil Départemental). Nous visitâmes les extérieurs, les intérieurs et les souterrains de la métairie où a vécu Rabelais durant une grande partie de son enfance. Une agréable cour permet d'atteindre le vaste pigeonnier et le logis. Le pigeonnier abrite une exposition de nombreux portraits de Rabelais. Au premier étage du logis, derrière le pigeonnier, nous avons visité la chambre de Rabelais. Depuis l'escalier, nous avons une vue sur la très belle campagne environnante et le château de Seully. Sous la totalité de la surface du logis se trouvent des troglodytes, bien conservés, pour abriter les bêtes, les outils agricoles, le pressoir, la cave à vin et aussi des logements. On a pu voir une très belle collection de bouteilles à vin dont la plus grande, un melchizedech, peut contenir 30 litres (1,10 m - 52 kg).

Au sujet de la vie de **François Rabelais**, nous avons reçu un très intéressant livret mis en page par Jacques Gaumé du club de Tours. En voici, ci-dessous, un extrait :

"Il est né autour de 1494 à La Devinière. Son père était avocat à Chinon. Avant ses études de médecine qu'il commença en 1530 à Montpellier, il alla dans un couvent chez les bénédictins.

Figure extraordinaire de son temps, il fut non seulement moine bénédictin, mais aussi médecin, professeur d'anatomie, et curé de Meudon. En 1532, il créa Gargantua et Pantagruel. Plus tard, il écrivit des romans tels que : "Horribles et épouvantables faits et prouesses du très renommé Pantagruel" (1532), "La vie inestimable de Gargantua, père de Pantagruel" (1534) et d'autres œuvres, Tiers Livre (1546), Quart Livre (1548), etc., lesquelles racontent les aventures suivantes de ces personnages. Spirituel, cultivé, il est un parfait exemple de l'esprit de la Renaissance : l'humanisme, le renouveau de la philosophie et de la pensée. Il aime à mélanger dans son œuvre la morale épicurienne, la joie et l'amour de la vie, la philosophie de la nature. Il a partiellement développé et renouvelé le français du 16ème siècle, lui donnant un «goût» pittoresque et succulent. L'Université de la Sorbonne a toutefois rejeté ses œuvres, et l'Église catholique les a interdites. François Rabelais est décédé le 9 Avril 1553".

Après la visite, nous sommes allés à un village proche, Cinais, pour un repas festif dans une auberge troglodyte. Entre les plats, nous avons fait de très agréables pauses pour chanter avec Famo (Fabrice Morandea) qui fut sollicité aussi pour chanter seul (en espéranto), et jouer "Amsterdam" de Jacques Brel à l'accordéon (souvenir de la belle soirée nationale au Congrès de Lille).

Merci à tous pour cette rencontre amicale, instructive et festive.

Geneviève

HUMORO

Kia konduto !

La aŭto iom zigzagas. La ĝendarmo, kiu havas dubon pri la kapablo de la ŝoforo, haltigas lin.
 - Montru al mi konduklicencon
 - Jen ĝi. Sed mi petas, ke vi redonu ĝin tuj, ĉar mi mem devas redoni ĝin al la amiko, kiu tiel afable pruntis ĝin al mi.



Frédéric Lauriol

Vagonaro

- Kara Sinjoro kondukto !
 Ĉu tiu ĉi trajno haltos ĉe ĉiu loko ?
 - Kial ? Ĉu vi volas ĉe ĉiu loko elvagoniĝi ?

Vendi loĝejon

- Kara interesiĝanto !
 Tiu ĉi loĝejo havas malavantaĝon sed ankaŭ gravan avantaĝon.
 - Kio estas la malavantaĝo ?
 - Oriente de ĝi situas granda porkejo kun kelkcent porkoj, okcidente kemia fabriko, norde karbohejtita energiocentralo kaj sude rubo-demetejo.
 - Diable ! Do kio povas esti la avantaĝo ?
 - Ĉi tie oni ĉiam scias, el kiu direkto blovas la vento !

Laborafero

Ĉefo al la sekretariino :
 - Kiu diris al vi, ke tial, ĉar mi volis kisi vin en la entreprena balo, vi rajtas jam neglekti vian laboron ?
 - Mia advokato.

Ni ludis

N° 19

- | | | | |
|----|--------------|---|----------------|
| 1 | KALENDAROJ | A | KERGELENOJ |
| 2 | EPIDERM - GE | B | APARTAMENT |
| 3 | RATAFI - URS | C | LITANI - TIG |
| 4 | GRAM - NAN | Ĉ | EDAM - KIA |
| 5 | ETN - IKTIOZ | D | NEF - IOM |
| 6 | LAIKO - OVO | E | DRINK - AMAS |
| 7 | EM - IMANENT | F | AM - ATONALA |
| 8 | NETA - MAR | G | UNIVERSO |
| 9 | ONI - VALSOJ | Ĝ | OGR - OON - ON |
| 10 | JTGN - SAONO | H | JES - TEJO |

Ni ludas

Horizontale :

- Malfideluloj.
- Olea palmarbo – Monpruntodonado kun ekscesa interezo.
- Subjunktio – Fandanta oro ! – Duono de Italio !
- Mita filino de Agamemnono (sf) – Du (inv).
- Scienco pri problemsolvado (sf).
- Femino (sf) – Kapo de sepio ! – Bestreĝo (sf).
- Malkutima, malordinara – La dektria greka litero.
- Membro de grupo (sf) – Verbo esprimanta la ekziston (sf).
- Fiziologia stato de ino dum la maturiĝo de la ovariaj folikloj (sf) – Eŭropa monunuo.
- Fibroj de korkoro (sf) – Plantpikiloj.

Vertikale :

- Homoj kiuj ĉiam vidas la malbonan flankon de ĉio.
- Azia mamulego (sf) – Duono de eŭro.
- Egipta sundio (sf) – Komenco de itinero ! – Ago de la krupiero (sf).
- Li ne plu memoras ion (sf).
- Valo kie Heraklo mortigis leonon (inv) – Ridi sen i !
- Prezanta ion tranĉitan meze – Kunigado de la du seksoj.
- Konsumi por sia utilo (sf) – Realtiĝi en la aeron (inv).
- Pagi por uzi ion dum difinita tempo – En ne precizigita loko – 1000 kg (sf).
- Tubo en televida kamerao (sf) – Valora metalo (inv).
- Nevo kaj generalo de Davido (sf) – Ili vojaĝas en la ĉielo.

N° 20 (sf) : sen finaĵo (inv) : inverse

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1										
2										
3										
4										
5										
6										
7										
8										
9										
10										

Ludigas nin Gérard Musset

Ni festis la Novan Jaron!

Okaze de la nova jaro 2016, la membroj de la Esperanto-klubo de Angers renkontiĝis restoracie, la 14-an de januaro vespere. Nia prezidanto, Jeanik Marolleau, organizis vesperon en libanan restoracion de Angers "Le Comptoir Phénicien". Ni konatiĝis kun la novaj gelemantoj de la unua nivelo (kun Vito Markov) kaj de la tria (kun Jeanik Marolleau), kaj estis granda plezuro refoje babilu kun la aliaj ĉeestantoj, kaj eĉ kun la restoraciestro, kiu al ni parolis pri sia deven-lando, Libano, temo tre bonvena ĉe Esperantistoj plejparte vojaĝamantoj, plej scivolemaj pri la tuta mondo!



Nous avons fêté le Nouvel An!

À l'occasion de la nouvelle année 2016, les membres de l'association d'Espéranto d'Angers se sont rencontrés le soir du 14 janvier au restaurant. Notre président, Jeanik Marolleau, avait organisé la soirée dans un restaurant libanais d'Angers, "Le Comptoir Phénicien". Nous avons fait connaissance avec les nouveaux élèves du premier niveau (de Vito Markov) et du troisième (de Jeanik Marolleau), et ce fut un grand plaisir de bavarder à nouveau avec les autres participants, et même avec le restaurateur qui nous a parlé de son pays d'origine, le Liban, thème exotique... bienvenu parmi les espérantophones souvent très voyageurs, désireux de connaître toujours davantage le monde entier.

Nous contacter

Centre Culturel Angevin d'Espéranto

41 rue Pierre Melgrani 49000 Angers
Tél. 02 41 73 17 97 - Courriel : info@esperanto-angers.fr

Maison Culturelle de l'Espéranto Château de Grésillon



Ni invitas vin lerni kaj ferii !

8-16 aprilo

PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1)
gresillon.org/printemps

20-24 aprilo

Korusa renkonto de Interkant' kaj verkadaliro Krajon'-Ankro
gresillon.org/koruso

12-17 junio

La Luaro laŭ la vortoj, turisma semajno laŭ verkistoj
gresillon.org/s1

4-15 julio

Dektaga kurso pri la esprimo de la tempo en Esperanto
gresillon.org/s2

6-13 aŭgusto

SOMERAS, la Esperanto-studad-semajno post FESTO
gresillon.org/s3

21-28 aŭgusto

Festa semajno por infanoj, adoleskantoj kaj familioj
gresillon.org/s4



8-16 avril

PRINTEMPaS, cours intensifs et examens KER (B1, B2, C1)
gresillon.org/printemps

20-24 avril

Rencontre de la chorale Interkant' et Krajon'-Ankro
gresillon.org/chorale

12-17 juin

La Loire au fil des mots, semaine touristique selon les écrivains
gresillon.org/s1fr

4-15 juillet

10 jours de cours sur l'expression du temps en esperanto
gresillon.org/s2fr

6-13 août

SOMERAS, la semaine d'étude en espéranto après FESTO
gresillon.org/s3fr

21-28 août

Semaine festive pour enfants, adolescents et familles
gresillon.org/s4fr

Kontakto:

kastelo@gresillon.org

telefone : +33-2.41.89.10.34

rete : <http://gresillon.org/kontakto>

Elsendo pri Esperanto ĉe RADIO G (101,5 FM)

En decembro 2015, Julie Angot, juna ĵurnalistino, venis por fari intervjuon dum nia esperanta konversacia kurso, kadre de asocia radio-elsendo kun la "Eŭropa domo de Angers" kiel partnero. Nia instruisto Jeanik Marolleau prezentis Esperanton, kaj lernantino, Pauline Gaborit, respondis al la demandoj de la ĵurnalistino kiu montriĝis tre interesata pri la koncepto de la internacia lingvo kaj ĝia utileco.

La intervjuo "Eŭropo en la mikrofono" estis elsendita la 12-an de januaro, sed ĝi estas plu aŭskultebla en Interreto. Jen la ligilo :

<http://www.radio-g.fr/content/leurope-dans-le-micro-12-01-2016>

Emission sur l'espéranto à RADIO G (101,5 FM)

En décembre 2015, Julie Angot, jeune journaliste, est venue pour faire une interview lors de notre cours de conversation d'espéranto, dans le cadre d'une radio associative en partenariat avec La Maison de l'Europe d'Angers. La parole fut donnée à notre enseignant, Jeanik Marolleau, puis une élève, Pauline Gaborit, répondit aux questions de la journaliste qui s'est montrée très intéressée sur le concept de la langue internationale et son utilité. Diffusée le 12 janvier, l'émission "L'Europe dans le micro" est toujours écoutable sur internet. Voici le lien :

<http://www.radio-g.fr/content/leurope-dans-le-micro-12-01-2016>

Vous informer

www.esperanto-angers.fr

www.esperanto-france.org, www.esperanto-jeunes.org
www.uea.org, www.esperanto.net